# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024: 41; oktobro 24.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: UNED, Zhiaoziang KB. Sume 390 KB

## Forpasis la populara verkisto István Némere

La 15-an de novembro forpasis István Nemere (1944-2024), eminenta hungara kaj Esperanta verkisto, aŭtoro de ĉirkaŭ 800 libroj, inkluzive de pli ol dudek libroj en Esperanto (parte reverkitaj el la hungara). Legu la nekrologon en *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2024/11/nemere-2/
**SMG:** Li verkis originale en aŭ la hungara aŭ Esperanto kaj poste transigis la verkon al la alia lingvo. Lia temaro gamis de sciencfikcio ĝis filozofio kaj natur-protekado. La hungara gazetaro abunde prezentis lian forpason.

## Plia forpaso – Claude Gacond el Svislando

Kun granda tristeco ni anoncas la forpason de Sinjoro Claude GACOND, honora membro de UEA, de ILEI kaj de Svisa Esperanto-Societo. Li dediĉis sian tutan vivon al Esperanto, kreante Kulturan Centron Esperantistan (KCE) kaj Centron de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI). Lia longdaŭra laboro por Esperanto estas ekzemplodona. Aperas vivrakonto pri Claude en www.eo.wikipedia.org kaj en www.edukado.net.

Sendis Mirejo Grosjean

## Hispana Universitato aktivas pluen

Komenciĝas la lernojaro 2024-2025, sed neesperantistoj volanta distance lerni Esperanton por ricevi universitatan diplomon pri ĝi, kien sin turnu? Nur UNED (Hispana Nacia Distanc-Eduka Universitato) ebligas studi nian lingvon distance, per interkonsento kun Hispana Esperanto-Federacio (HEF). UNED estis fondita en 1972 kiel publika distanca universitato komparebla al la brita *Open University*, kaj fariĝis la plej granda hispana universitato, kun pli ol 150 000 studentoj la pasintan jaron. //Alk estas: ES UNED

## Interna Mongolio okupiĝas pri Esperanto

Oktobre okazis Nacia Simpozio pri Ĉina Esperanto-Instruado en Huhehaote (Hohhot), la ĉefurbo de Interna Mongolio. Subtene de Ĉina Esperanto-Ligo. ĝin organizis la Interna Mongolia Honder-Kolegio de Artoj kaj Sciencoj, en kiu Esperanto estas instruata kiel nedeviga studobjekto. De sia fondiĝo Liaoninga Esperanto-Kultura Klubo (LEKK) ricevas la prizorgon kaj subtenon de ĈEL. En la simpozio s-ro Liu Weijie, fondinto kaj honora prezidanto de LEKK, prelegis pri 'Novigo kaj

Praktikado de Eo-instruado en la Nova Epoko'. La kursanoj venas el la tuta lando kaj krome Tibeto, Honkongo, Makao kaj Tajvano per retaj Esperanto-kursoj. La klubo atingis la Esperanto-disvastigon en la tutlanda skalo per funkciigo de la reta Esperanto-kurso por Ĉina Asocio de Volontuloj. La klubo sukcese faris la prelegon pri Esperanto por La Novaĵa Lernejo de Liaoninga Komunika Universitato.

S-ro Wang Hanping, vic-prezidanto de ĈEL, kiu prezidis la simpozion.

## Kurso en Fortalezo, sen forta lezo

Baza kurso de Esperanto okazas en la Universitato de Cearao - Fortalezo - Brazilo

https://casasdeculturaestrangeira.ufc.br/pt/inscricoes-abertas-para-o-curso-basico-de-esperanto/

## Memore al ĉilia aktivulo

Forpasis oktobre Iván Mättig Catalán. Deveninte el Curacautín, Iván interesiĝis pri Esperanto jam en frua aĝo, kiam li estis studento de Seminario de la Katolika Eklezio, en San José de la Mariquina (Valdivia). Iván iĝis la ĉefa motoro dum unu el la plej gravaj fazoj de la Esperanto-agado en Ĉilio, kies mejloŝtono estis la refondiĝo de Ĉilia Esperanto-Asocio (ĈEspA) en 1977, kune kun aliaj pioniroj kiel Daniel Zanelli, Alfonso Toloza, David Alvéstegui kaj Jorge Tachauer. Jam en 1979 UEA agnoskis ĈEspA kiel landan asocion. Ivan konsentis prezidi ĈEspA per sinsekvaj reelektoj, ĝis plenumi 30 jarojn da gvidado. Li estis reprezentanto de UEA por Santiago kaj fakdelegito pri filatelio kaj ekumenismo. Li korespondis kun esperantistoj de pli ol 98 landoj, kio permesis al li starigi filateliajn ekspoziciojn, kiuj bele bildigis la reton de kontakto inter homoj ligitaj per komuna lingvo. Li akceptis multajn eksterlandajn vizitantojn, ĉiam kun afableco. Li kaj la edzino partoprenis en Universalaj Kongresoj, ekzemple en Brazilio kaj Bonaero.

Lia engaĝiĝo por disvastigi Esperanton en Ĉilio manifestiĝis per koresponda kurso, kiun li mem kreis kaj gvidis. Tiu permesis, en la antaŭinterreta epoko, plivastigi la komunumon de Eo-parolantoj en Ĉilio precipe dum la 1980-aj jaroj.

**Hector Campos Grez**

## Altkvalita jutuba kanalo de CED

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), fondita de Ivo Lapenna, ludas kernan rolon en la faka studado de Interlingvistiko kaj Esperantologio ekde 1952. La jutuba kanalo de CED enhavas prelegojn de kompetentaj (inter)lingvistoj kaj famaj esperantistoj kiel Philippe Planchon, Michele Gazzola, Ilona Koutny, Vincente Manzano Arrondo (Viko), Javier Alcalde, Alessandra Madella, Guilherme Fians, ...
Jen ĝia adreso: http://www.youtube.com/@CEDInterlingvistiko. Vi povas ekaboni la kanalon por tuj informiĝi pri la novaj spekteblaj prelegoj. Kaj se vi deziras pli scii pri CED, jen ĝia retejo: https://interlingvistiko.net/

## EKO ne plu listigos kursojn

Kursoj abundegas kaj la renoma retejo <edukado.net> zorge dokumentas ilin en la paĝo: https://edukado.net/kursejo

**SMG:** Se kursoj tiom abundegas, kial UEA ne havas ses mil membrojn kaj ILEI plian milon? Ĉu la kursoj ne havas fortan efikon? Ĉu ili ne prezentas sufiĉe la organizitan movadon, Ĉu ili ne spronas kursfinintojn al movada engaĝiĝo?

## La amo de origamo

En EsperRadio (https://www.facebook.com/esperradio, https://www.youtube.com/@EsperRadio) estos elsendita intervjuo, farita de mi kaj Laŭra Brazzabeni, al Larysa Osadchuk, biologino, esperantistino kaj majstrino de origamoj. Larysa, kiel ŝi diras en la intervjuo, utiligas origamojn por plibonigi la manan kapablon de infanoj, stimuli la homojn, kiuj estas trafitaj de *alzheimer*, instrui Esperanton kaj atingi aliajn gravajn celojn. Per la intervjuo estos anoncita nova programo, per kiu Larysa instruos la arton/sciencon de la origamoj.

Nicola Morandi, el "Pistoja Esperanto-Grupo

## Scienca Kalendaro denove en Esperanto

Probable vi jam konas la sciencan kalendaron kiun aperigas ankaŭ en Esperanto la Supera Konsilio pri Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC). Rigardu la kalendaron de 2023 en https://digital.csic.es/handle/10261/285166 kaj la asociitan ĉiutagan eventaron ĉe: https://x.com/SciKalendaro). La Konsilio konfirmis ke aperos la kalendaro en 2025, kaj ĉi-jare (post interrompo en 2024) ĝi estos publikigata en PDF ankaŭ en Esperanto. Hispania skipo laboras super la tradukado de la eventoj, sed ni bezonas reviziadon de nehispanlingvanoj, kaj ankaŭ fare de sciencaj fakuloj, ĉar la sciencaj terminoj ne ĉiam estas evidentaj en Esperanto. Volontuloj kontaktu min,

José Antonio del Barrio, http://www.delbarrio.eu

## Esperanto en la Jagelona Universitato

Okazas kursoj de Esperanto je ĉiuj niveloj. Ĉiujare la universitato en Krakovo. Pollando, anoncas kurson por komencantoj (niveloj A1-A2) kaj laŭtemajn kursojn internaciajn. De minimume 10 jaroj estas regule ofertata perreta baza kurso por ĉiuj poloj, vivantaj en Pollando aŭ eksterlande. Peto por gratulmesaĝoj estas dissendita nome de la Universitato, en kiu Esperanto estas instruata de pli ol 100 jaroj. Gratulmesaĝoj venis el Ĉinio, Britio, Francio, Irano kaj aliaj

Marija Majerczsak

## Hispane elane per la kongresoj

La 82-a Hispana Esperanto-Kongreso sukcese okazis de la 5-a ĝis la 9-a de septembro 2024 en Valencio kun pli ol cent partoprenantoj el dudek landoj. Legu prian artikolon de Dennis Keefe en la aŭtuna eldono de *La Ondo de Esperanto* (2024, №3) aŭ en la novaĵretejo ĉe https://sezonoj.ru/2024/10/hispanujo-5/

## Togolanda elpaŝo

Okaze de informa kunsido por ĵus abiturientiĝintoj en la publika universitato de Lomeo, s-ino Judith Massan parolis pri nia lingvo al la gejunuloj, kiujn ŝi renkontis en septembro. Ŝi kunportis kalendarojn kaj flugfoliojn. Tiujn ĉi informilojn ŝi disdonis, klarigis pri nia lingvo kaj respondis demandojn. Inter la gestudentoj, kiujn ŝi renkontis, iuj montris intereson pri Esperanto kaj konsentis doni siajn kontaktojn por posta rilato. Laboro estas farata cele al enmovadigo de la renkontiotoj.

Adjévi Adjé

## Pole kaj angle pri Esperanto

Mia anglalingva raporto pri la interlingvistika laborsekcio dum la 21-a Internacia Kongreso de Lingvistoj (en Poznano, sept. 2024) aperis en la hejmpaĝo de la *Comité Internationale Permanent des Linguists:* https://ciplnet.com/interlinguistics-workshop-during-icl21/ kaj estis dissendita en ilia novajxletero.

Cetere, la pollingva raporto aperis en la retejo de la Etnolingvistika Fakultato de AMU: https://we.amu.edu.pl/sekcja-interlingwistyczna-podczas-21-international-congress-of-linguists-icl-poznan-12-13-09-2024/

Ilona Koutny

## Laŭdo al EKO el Ĉinio

Mi legis ĉi tiun numeron. Mi kore dankas vin pro tio, ke vi aperigis mian raporton. De dek unu jaroj vi persistas en redaktado de EKO-komunikoj. Vi kontribuis por nia lingvo kaj instigas multajn esperantistojn kaj Eo-organizaĵojn.

Wu Guojiang, Prezidanto de Liaoning-a Esperanto-kultura Klubo(LEKK), Ĉinio

## Disiras la forta VoKo

Kadre de la Virtuala Kongreso de UEA estas planata unu-hora prezento pri la agado en Eŭropo fare de EEU, EDE kaj la Eŭropa Komisiono de UEA.

***Juna Amiko – junkora kaj valora!***

***Jen revuo, kiu meritas (re)abonon!***

========= vortoj: 1275 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.